



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 65 fkoj } P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1987 - 3


(JULIO-AUGUSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



Kiel la prahomoj sukcesis paŝi kaj paroli.



La ĉaspaviliono de reĝo Francisko

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A.Frangeul)	2
Reĝa ĉaspavilono (E. Motillon)	3
Kiel la prahomoj sukcesis paŝi kaj paroli (F. Boyet)	4-7
La enigma turo (R. Watier)	8
Paĝo de la geknaboj (A. Childs-Mee)	9
Boitelle (eltiraĵo) Maupassant	10
Vespere komenciĝis...(L.Tihanyi)	11
Por via distro (C. Cavalié)	12
La vie de Grésillon	13-14

El Grésillon

En la tuta mondo, dum la somero, pli malpli solene, estis festita la centjara datreveno de Esperanto. Ankaŭ en Gresillon, kie la festo celis ĉefe la ĉeestantojn, la lokajn instancojn kaj tiujn entreprenistojn kaj laboristojn, kiuj, iamaniere, partoprenas en la vivo de la Esperanto-Domo.

La 18-an de julio, dum la Jubilea Semajno, kiu venigis altvalorajn prelegantojn, estis inaŭgurita memorŝtono kun la gravurita surskribo: " Esperanto Centjara - 1987 " La prezidanto faris mallongan paroladon, kies konkludo estis: " Kiuj aliaj vilaĝoj ol la viaj rajtas fieri pri la fakto, ke ili estis vizitataj de homoj el kvindek kvar diversaj landoj ? "

En la posttagmezo de la sama tago, la panisto, kies pano la grezianoj kutime manĝas, faris grandan surprizon mem prezentanta kukojn "Esperanto". La recepto de tiu kuko estas nun patentita. Gustumado sekvis akompanata, kompreneble, de bona

"Esperanto". La recepto de tiu originala kuko estis poste patentita. Gustumado sekvis akompanata de bona vino, kompreneble.

Dum du semajnoj en julio estis prezentata, fare ankaŭ de la Esperantista Grupo de Baugé, en salono de la Kultura Centro de tiu urbo, ekspozicio. Tiu ekspozicio akceptis sufiĉe multe da vizitantoj, lokaj kaj turistaj, kaj donis la okazon al kelkaj eksesperantistoj refreŝigi sian entuziasmon.





LA JUBILEA UNIVERSALA KONGRESO

EN VARSOVIO - La pola esperantistaro ege laboris, por ke la 72-a universala kongreso de UEA estu impona kaj memorinda. Proksimume 6 000 gepartoprenantoj el pli ol 60 landoj ĉiutage kunvenis en la giganta palaco de la kulturo kaj de la scienco. Pli ol 20 registaroj sendis reprezentantojn al la inaŭguraj solenaĵoj kaj la reprezentanto de la direktoro de UNO restis dum la tuta semajno. La prezidanto de la pola parlamento anoncis la starigon, en Bjalistoko, de Monda Esperanto-centro. La nacia arta vespero, la internacia arta vespero, la prezentado de la Ensemblo de kanto kaj danco de la Varsovia Politekniko estis tre altnivelaj. Profesiaj kantistoj de la Operejo de Varsovio kantis erojn de pola opero en esperanto.

En 1988 la UK de UEA okazos en Roterdamo de la 23-a ĝis la 30-a de julio kaj, en 1989, en Brighton (Britio).

LA KONGRESO EN BULONJO-SUR-MARO-

La 60-a kongreso de SAT arigis pli ol 400 esperantistojn inter la 22-a kaj la 29-a de aŭgusto. Oni festis la 1-an kongreson de Esperanto, kiu okazis tie en 1905 en la ĉeesto de Zamenhof. Multaj aranĝoj: prelegoj, artaj vesperoj, ekskursoj, sukcesis kaj favoraj reagoj aperis en la nacia gazetaro. Ankaŭ sukcesis la post-kongreso organizita en la Esperanto-Domo Gresillon.

En 1988 la kongreso de SAT okazos en Camp do Jordao, Brazilo.

ALIAJ OKAZINTAĴOJ- Dum la semajno antaŭ la UK la junulara kongreso kunigis proksimume 1 000 partoprenantojn en Krakovo, samtempe kiel la kongreso de la esperantistaj kuracistoj. La katolikoj kunvenis en Czestochowa. Dume okazis en la universitato de Lodz la 21-a konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La membroj de la pedagogia movado "Freinet" kunvenis en Poznan.

OKAZOS EN 1988- La 44-a Internacia Junulara Kongreso, en Zagreb, 16/23-de julio. Kroata Esperanto-Ligo, Amruševa 5/1 YU-41000 Zagreb.

40-a Fervojista Kongreso de IFEF, en Perpignan (Francio), 4/11 de junio. IFEF-Kongreso, 1bis rue d'Athènes, 75009 Paris.

Por junuloj kaj mezaĝuloj, 31-Internacia Seminario 27/12 87 - 3/1 88. Temo: "Sano". GEJ-GEA Eifelstr. 9, D-5300 Bonn 1.

Kaj la diversaj aranĝoj en la Esperanto-Domo Gresillon (Francio), la Kultura Centro Esp. en La Chaux-de-Fonds (Svisio), La Kvinpetalo, Bouresse (Francio). Petu jam la programojn.

PERMAŜINA TRADUKADO- La nederlanda firmo BSO daŭre esploras la uzadon de la internacia lingvo por konstrui permaŝinan tradukadan sistemon. En 1987 la esplorinvestoj por la sistemo DLT superos 6 milionojn da guldenoj. Pliaj 11 milionoj estas antaŭviditaj por la trijara periodo 1988-1990. La surmerkato de DLT komenciĝos en 1993. Kompetentaj esperantistoj kunlaboras.

INFORMOJ EL AZIO- Korea Turisma Korporacio agnoskis esperanton, kiel unu el la tradukaj helpiloj. 28 esperantistoj de Seulo estis registritaj, kiel eventualaj interpretistoj.

La 6-a komuna seminario de japana kaj korea junularo okazis en Biwa (Japanio). Oni planas pliampleksigi la seminarion por akcepti ĉinajn kaj aliazilandajn gejunulojn.

2-a Konferenco pri scienco kaj tekniko en esperanto, en Pekino, 10/16an de aŭgusto 1988. Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, Ĉina Akademio de Sciencoj, 52, Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

Se vi planas viziti Koreujon okaze de la 1988-Olimpikoj, rilatu kun Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. Kesto 4258, Seulo, 100, Koreujo.

Ĉinio, kiel aliaj landoj, emisiis poŝtmarkon por la jubileo de esperanto.

En centra Franclando, sude de Orleans, estas tute aparta lando nomata Sologne, ankoraŭ preskaŭ sovaĝa. Pli ol 7 000 kvadratajn metrojn vasta, ĝi estas kovrata de profundaj arbaroj kun marĉoj kaj lagetoj. Ĝi abundas je ĉasbestoj kaj estas paradizo por ĉasistoj.

Dum la 16-a jarcento ĝi estis grandparte nekulturita kaj aspektis sovaĝa. Tie la reĝa familio posedis grandan bienon, preferatan ĉasejon de la princoj. Sed ĉasantoj, bone atentu! En tiuj arbaroj kreskas la "vojerariga herbo". Ve al tiu, kiu tretas ĝin! Li tuj forgesos la vojon kaj dum tutaj tago kaj nokto li devos vagadi senhelpe tra la arbaro. Post vesperiĝo li certe renkontos, kaj devos sekvi, la fantoman ĉasprocesion de grafo Tibaldo la Trompanto, vivinte dum la 10-a jarcento, kondamnita je eterna vagado kun siaj ĉashundoj pro ia malbonfaro. Nur ektagiĝo povos liberigi la malfeliĉulon, kiu surpaŝis la sorĉan herbon.

Iam la juna kronprinco Francisko estis viktimo de la vojerariga herbo. Sed kiam, forperdinte la ĉasantaron, li estis ekkaptinta de la nokto, lia ĉevalo subite timigita haltis antaŭ salamandro. La princo desaltis de la ĉevalo kaj feliĉe ekvidis tra la arboj la ruinaĵojn de la kastelo de Tibaldo. Li povis trovi sian vojon. Memore al la besteto, kiu rompis la sorĉon, Francisko adoptis la salamandron, kiel insignon, kaj decidis, ke li konstruigos ĉaspavilonon sur tiu sama loko. Tia estas la legendo de la kastelo de Chambord multe pli bela ol la nura historia vero.

Ne longe post tiu aventuro, en 1515, Francisko fariĝis reĝo Francisko la Unua. Kvin jarojn poste 1 800 laboristoj estis senditaj kaj komencis la konstruon ne de rendevuejo sed de grandioza palaco. Ĝi estas ĉefverko de la Renesanco konstruanto. Novaĵon iniciatis la reĝo: anstataŭ tegmento vasta teraso, de kie estas facile vidi la ĉasantojn en la ĉirkaŭa arbaro. Kun siaj 365 kamenoj, multegaj kolonoj, ornamitaj de 800 kapiteloj ĉiuj malsa-

maj, tiu teraso aspektas kiel vera aera vilaĝo. Ĝi estas unika arkitekturaĵo, same kiel la kurioza duobla ŝtuparo, per kiu oni ĝin aliras.

Francisko estis granda, eleganta viro, sprita, artistema, vera modelo de la ideala "galanta kavaliro" de tiu epoko. Tial li havis multajn sukcesojn en siaj virinaj rilatoj. Malfidela li ja estis, sed ankaŭ suferis pro virina malkonstanteco. Iun melankolian tagon li tion esprimis per la du famaj versoj skribitaj per lia ringo sur vitraĵo:

"Virino ofte varias,
malsaĝa kiu ŝin fidas"

Oni diras (legendo aŭ historia fakto?), ke lia glora posteulo Ludoviko 14-a rompis la vitraĵon omaĝe al sia amatino.

Tri jarcentojn pli poste, tiuj du versoj inspiris unu el la plej belaj muzikaĵoj de la itala muzikarto. La itala komponisto Verdi verkis la faman operon "Rigoletto", laŭ poemo de la itala poeto Piave, inspirita de dramo de V. Hugo, "La Reĝo sin amuzas" temanta pri drameca amaventuro de Francisko la Unua. En la opero la reĝo, kiu fariĝis duko de Mantovo, kantas tre belan kanton: "Kiel plumo en vento", kies rekantaĵo estas ĝuste la versduo de Chambord. Tiu kastelo okupas tute apartan lokon en arto. Tie Molière kreis en 1669 du el siaj komedioj: "Sro de Pourceaugnac" kaj "La Burĝo Gentilhommo".

La brila epoko de Chambord finiĝis je la Franca Revolucio. En 1821 ĝi estis vendota. Laŭ iniciato de franca nobelo la kastelo estis aĉetita dank'al publika monkollekto kaj donacita al duko de Bordeaux, heredonto de la franca trono. Post diversaj ŝanĝoj la kastelo estis fine aĉetita de la franca ŝtato en 1932.

Dum la dua mondmilito ĝi fariĝis ŝirmejo por la trezoroj de la francaj muzeoj kaj por la vitraloj de la katedraloj. Fakte ĝi neniam estis bombardita. Kelkaj pretendas, ke Hitler firme kredanta je sia fina venko konsideris, ke Chambord


Kiel la prahomoj sukcesis paŝi kaj paroli

Kiam bebo naskiĝas, ĝi kapablas nek paŝi nek paroli. Sed inter la naskiĝo kaj la dujara aĝo, ĝi iom post iom akiras tiujn kapablojn. Kompreneble, ĝi parte lernas sub la influo de la socia medio, sed tiu lernado postulas antaŭan lernkapablon, kiun la infano ricevis en la momento de la koncipiĝo, kiam la genoj de la patro unuiĝis kun tiuj de la patrino.

De kiam tiuj lernkapabloj estas en la genaro de la homoj? Por respondi al tiu demando necesas elvoki la diversajn fosiliojn, kiujn oni ĝis nun studis, pri la diversaj stadioj de la evoluo inter la fruaj primatoj kaj la nuna homo. Kiam oni studis fosiliojn oni tendencis doni al ĉiu fosilio iun propran nomon, en rilato kun la loko, kie oni malkovris ĝin. Ekzemple oni priskribis en 1894 fosilion, kiu tiam aspektis, kiel specio meza inter la simioj kaj la homoj kaj oni nomis ĝin laŭ la grekaj radikoj: Pitekanthropo. Poste en 1927 oni trovis alian fosilion kiun oni nomis Sinantropo (tio signifas "homo de Ĉinio"). Sed nun post multaj aliaj eltrovoj, precipe sed ne nur tie, en la orienta parto de Afriko, oni opinias, ke la du unue priskribitaj fosilioj apartenas al la sama specio, kies latina nomo estas "Homo erectus", kaj Stop-Bowitz tradukis ĝin per "rekta homo" (oni notu, ke en scienca lingvo ĉiu specio estas nomata per du vortoj: iu substantivo, kiu montras la genron, kaj iu adjektivo, kiu apartigas la specion disde la aliaj specioj de la sama genro.)

En mia klarigo, mi uzos la modernajn nomojn de la specioj, kiuj estas prezentitaj sur la ĉikuna skemo. La nombroj de la skemo montras la daŭron, kies unuo estas la miliono de jaroj.

La staranta paŝado kaj la naskiĝo de homo.



Kun la Aŭstralopitekoj aperas la vertikala paŝado.

En la sinsekvo de la specioj, en la familio de primatoj, kie naskiĝis la genro homo, la unua grava stadio aperas, kiam la tiamaj animaloj komencis paŝi pli malpli vertikale.


Kiel kutime en paleontologio, oni pravigas la ŝanĝojn per duobla influo: iuflanke estas mutacio en la genaro (interna faktoro) kaj aliflanke estas ekstera faktoro, kiu favoras la ĵusajn mutaciintojn.

La antaŭaj primatoj loĝis en arboj, kie ili grimpis helpe de siaj kvar membroj. Oni nun scias, ke iam en Afriko okazis ŝanĝo de klimato kaj dum en la okcidenta parto daŭre restis la arbaroj, en la orienta parto, pro sekiĝo

de la klimato, la arbarojn anstataŭis savano. Kompreneble tiu orientaŝa klimato estis malfavora por la estuloj de la arboj kaj kontraŭe favoris la estulojn, kiuj kapablis paŝi sur la tero de la savano.

La plej malnovaj primataj fosilioj, kiuj kapablis paŝi sur du piedoj ricevis la nomon "afara aŭstralopiteko" (latine "Australopithecus afarensis". Kial oni opinias, ke tiuj estuloj kapablis pli malpli vertikale paŝi sur nur du piedoj? Ĉar la ostaro de la pelvo ŝanĝiĝis. Kiel oni povas vidi sur la tiutema skemo, la pelvo de aŭstralopiteko estas pli larĝa kaj malpli longa ol tiu de la simioj; la ĉefa diferenco rilatas al la koks-osto nomata "ilio". Alia ŝanĝo okazis je la nivelo de la kapo: kiam la spino vertikaliĝis, la fiksado de la kranio sur la spino okazis je pli antaŭa parto de la kranio.


Pelvo de ĉimpanzo



Pelvo de Aŭstralopiteko afara



Kranio de simio (la suba parto estas preskaŭ plata)



Kranio de Homo saĝa (la suba parto montras angulon)

Poste vivis aliaj aŭstralopitekoj, de aliaj specioj, kiujn oni povas nomi, laŭ la sistemo de Stop-Bowitz afrikana kaj fortika. Tiuj novaj aŭstralopitekoj konservis la saman pelvon, iom tro larĝan por vere efika vertikala paŝado, sed tamen ili vere estis dupieduloj. Ili bezonis por paŝi fortikajn muskolojn, kaj fakte, iom post iom aperis la pli fortikaj specioj. La korpo pligrandiĝis ili paŝis vertikale en la savano, sed ili konservis malgrandan kranion. Oni povus diri, ke la aŭstralopitekoj havas krurojn de homo, sed kapon de simio.

Apero de la homo.

Antaŭ du milionoj da jaroj aperis novaj estuloj, kies kapo estis multe pli dika. Sed pro la dikeco de tiu kapo okazis naska problemo. Jam pro la antaŭa ŝanĝo de la pelvo, la nasko estis pli malfacila, sed tamen la kapo de naskiĝanto estis pli malgranda ol la kanalo tra kiu la novulo aperis en la plenan aeron. Sed kun la nova estulo, kies latina nomo estas "Homo habilis" kaj kiun Stp-Bowitz nomas lerta homo, la kapo ne povus trapasi la kanalon, se la nasko okazus pli malfrue. Iuj sciencistoj opinias, ke la homa bebo estas frunaskitulo, kiu naskiĝas frue, ĉar la evolucio de la individuo estas multe malpli rapida. Pro tiu malrapida evolucio de la homo, kiu fakte similas al feto de simio, ĝi kapablas akiri, dum tiu longa junaĝo, kiu daŭras post la naskiĝo, multe pli da sociaj educaĵoj, kiuj estas la bazo de la homa kulturo. Kiel aliaj konsekvencoj de tiu ŝanĝo, la formo de la pelvo fariĝis malpli larĝa de maldekstre dekstren, sed pli larĝa de antaŭe malantaŭe, kaj pli grave, ŝanĝiĝis la pozicio de la kapo, kies fiksaĵo sur la spino pliantaŭeniĝis. La kranio tiel fariĝis pli bone ekvilibrita sur la vertikala korpo.

Kiam la homo kapablis paroli?

La sciencistoj sukcesis instrui al ĉimpanzoj la gestan lingvon de surdmutuloj. Sed en la naturo neniam la simioj kreis iun sistemon por interkomuniki. Tio ŝajne montras,

ke interkomunikilo kreiĝas, kiam la estuloj konscias pri la bezono, kaj tio ne okazis kun la simioj en la naturo. Kontraŭe oni scias, ke la homoj komune ĉasis, ke ili desegnis sur grotoj... Tio pruvas, ke la homoj bezonis komuniki, kaj, ke ili uzis diversajn sistemojn por tio. Sed kiam ili sukcesis interkomuniki per parolo?

La cerbo kaj la parolo.

La uzo de la iloj kaj la kapablo komuniki rilatas al la samaj partoj de la cerbo, ĉar en ambaŭ okazoj temas pri imago de sinsekvaj bildoj por konstrui la ilojn kaj la frazojn. Kaj kiam oni trovis la unuajn plej simplajn ilojn, tiam vivis kaj aŭstralopitekoj kaj lertaj homoj. Ĉu ambaŭ fabrikis la ilojn? Ĉu ambaŭ kapablis paroli?

Kiam oni studas la nun vivantan homon, oni scias, ke la cerbaj centroj de la parolo estas bone konataj. Oni nomas la volvaĵojn de la supro de la cerbo laŭ la ostoj sub kiuj ili kuŝas kaj la centro de la esprimkapablo per parolo lokiĝas en la tria fruntala volvaĵo. Kiam oni konstatas tiun volvaĵon detruita, tiam la homo ne plu kapablas paroli, spite al la bona sano de siaj voĉaj organoj. Laŭ la sama sistemo oni scias, ke la komprenkapablo de la parolo lokiĝas en la unua temporalaj volvaĵo. Tio signifas, ke homo tie vundita ne plu povas kompreni tion, kion oni diras kvankam lia orelo bone kaptas la sonojn.

Kio estas la utileco de tiuj detaloj por la studo de niaj fosilioj. Fakte ĉiuj molaĵoj malaperas kun la morto, sed, feliĉe por la sciencistoj, la ostoj konservas la markon de la molaj partoj de la cerbo. Tiel en studo de la interna parto de kranio, oni povas trovi la spuron de la tria fruntala volvaĵo, tiu de la esprimkapablo, se temas pri lerta homo, sed oni neniam trovis tian spuron en la kranioj de aŭstralopitekoj eĉ se temas pri fortika aŭstralopiteko. Oni do jam povas supozi, ke nur lertaj homoj kapablis sin esprimi per parolo.

La organoj de la voĉo.

Por paroli oni bezonas vokalojn kaj konsonantojn. Kaj tio venas, ne nur de la voĉaj kordoj, sed precipe de la multaj vibradoj kaj resonoj, kiuj okazas en la faringo kaj en la buŝo. Ĉe ĉiuj mamuloj ĝis la simioj, kaj eĉ la nuna homa bebo, la faringo estas malgranda. La laringo staras alte, je la nivelo de la tri unuaj vertebroj, kaj la du vojoj: por la aero ĝis la pulmoj kaj por la manĝaĵoj ĝis la stomako, paralelas. Tial, ekzemple la homa bebo povas gluti kaj spiri samtempe. Por la nuna homo, kelkajn semajnojn post la naskiĝo, la laringo malsupreniras ĝis la nivelo de la 6-a kaj 7-a vertebroj. Dank'al tio la faringo pligrandiĝas kaj la sonoj, kiuj fontas el la voĉaj kordoj povas diversiĝi en tiu nova faringo. Kompreneble ĉiu medalo havas du flankojn; la malavantaĝo estas, ke la nuna homo ne plu povas gluti spirante sen risko de sufokiĝo.

Kompreneble, kiam oni studas fosiliojn ne plu estas laringo, lango k.t.p. sed restas la malsupra parto de la kranio, kie fiksiĝis la muskoloj, kiuj rilatas kun la laringo, kaj, krome, supra pozicio de laringo respondas al rekta formo de la malsupro de kranio, dum al malalta laringo respondas angula formo de la malsupro de kranio. (Vidu la skemon de la antaŭa paĝo).

La kranio de aŭstralopiteko estas plata, kio tendencas pravi, ke tiu ne kapablis paroli. Tial oni povas racie supozi, ke tiu estulo ne parolis. Pri la homoj, oni trovas angulan malsupron de la kranio ekde la rekta homo. Do kion pensi pri la lerta homo? Laŭ la cerbo ĝi kapablas sin esprimi, sed laŭ la malsupro de la kranio ĝi ne havas taŭgajn voĉorganojn. Fakte estas diversaj ŝtupoj en la kvalito de lingvo. Iu sciencisto speciale studis la parolkapablon de unu fosilia homo: neandertala homo (latine: Homo sapiens neanderthalensis). Laŭ tiuj studoj tiu homo ne povis aŭdigi la vokalojn "a", "i" kaj "u", kaj krome, pro la proksimeco

de la lango kun la palata velo, la konsonantoj "k", "g", "s", "z", "ŝ", "ĵ" estis ne prononceblaj. Oni povas rimarki, ke la lingvo de tiu homo ne estis tiel riĉa kiel estas nia, sed oni povus uzi lingvojn kun malmulte da vokaloj (iu kaŭkaza lingvo entenas nur unu vokalon, sed estas 80 konsonantoj) Oni ankaŭ povas uzi la kriterion de la alteco de la vokalo kun ĝia variado. Ekzemple en la ĉina lingvo, kiam oni prononcas "li" kun plialtiĝanta tono la vorto signifas "piro", kaj la sama vorto kun malaltiĝanta tono signifas "kaŝtano".

Alia rimarko estas interesa. Ĉar en la juna nuna infano la laringo malaltiĝas nur iom post iom, oni komprenas, ke la unuaj konsonantoj estas la labialoj kaj dentaloj, dum la velaroj "k", "g" kaj gingivaloj "ŝ" kaj "ĵ" estas malfacile prononcataj. Oni povas diri ke, iel, la juna infano parolas same kiel la neandertala homo.

Konkludo:

En la evoluo de la estuloj, kiu okazis dum kvar milionoj da jaroj, oni unue konstatis la vertikala staron kun dupieda, paŝado, kiu estas la unua diferenco rilate al la simioj.

La unuaj dupieduloj estis afaraj aŭstralopitekoj, kiujn anstataŭis la afrikanaj kaj poste fortikaj aŭstralopitekoj. Ĉiuj tiuj estuloj havis malvastan cerbon kaj malaltan laringon, tial ili ne kapablis uzi veran lingvon (kompreneble ili povis krei same kiel la simioj). En la tempo de afrikana aŭstralopiteko aperis nova estulo, kun pli dika kapo, kun pli rektaj kruroj, kiu paŝis pli vertikale kaj kiu naskiĝis frue en la evolviĝo de la individuo. Tiu estulo estas lerta homo, kiu fabrikis ilojn kaj verŝajne kapablis iom paroli, dank'al sia cerbo, sed ne havis tre perfektan lingvon pro la formo de la voĉorganoj.

Nur unu milionon da jaroj antaŭ nia tempo aperis la rekta homo, kies voĉorganoj permesis la uzon de faringo por pli perfekta lingvo. Tamen tiu evoluo estis malrapida, kaj eĉ en la tempo de neandertala homo mankis konsonantoj kaj vokaloj, kaj oni povas diri, ke nur la saĝa homo (latine: homo sapiens), antaŭ cent mil jaroj, sukcesis paroli lingvon similan al la nia.

El prelego prezentita en Grésillon

de Fernand BOYET

LA ĈASPAVILONO DE REGO FRANCIŬO (Fino)

estis legitima bieno de la aŭstralia familio, kiu ĝin iam posedis kaj pro tio ne volis, ke ĝi estu detruita. Eble pli simple estas kredi, ke ĝi estis savita dank'al sia situo meze de arbaro, sen ia strategia intereso. Nun Chambord estas unu el la plej vizitataj kasteloj de Francio. Ĝia sonluma spektaklo estas vere grandioza kaj altiras multegon da turistoj.

La vasta parko, ĉirkaŭata de unu muro 42 kilometrojn longa,

fariĝis ŝtata bredejo por ĉasbestoj; en ĝi pace vivas cervoj, kapreoloj, fazanoj, k.t.p.; la arbaro ne plu reeĥas la bojojn de la hundoj kaj la vokojn de la ĉaskornoj. Nun ĉaso konsistas nur el pelado de la bestoj en retegojn, kie ili kaptiĝas kaj estas poste senditaj preskaŭ en la tuta mondo.

Verkis: E. Motillon

LA ENIGMA TURO

Kiel bone scias familianoj de nia kastelo Gresillon, ĉi tiu troviĝas en franca regiono de Loire-valo plena je historiaj kaj pitoreskaj vidindaĵoj. Survoje de Baugé al granda urbo Tours, laŭlonge de la riverego Loire, sur dekstra bordo estas videbla kuriozaĵo nomita france "La pile de Cinq-Mars"; Cinq-Mars estas la nomo de la apuda vilaĝo, kiu ricevis ĝin de juna kavaliro, favorito de la reĝo Ludoviko la Dektria, sed estis akuzita pri komploto kontraŭ la reĝo, juĝita kaj kondamnita je morto. Sed la monumento "La Pile", t.e. la turo, havas devenon multe pli antikvan. Ĝi estas konstruita el multaj tavoloj de brikoj kvadratforme almetitaj kaj en suma nombro de 120 000. La brikoj estas kunligitaj per malmola cemento tre fortika, jam uzata de la romianaj konstruistoj. Ĉiu supermetita tavolo havas dikecon de 1,10 aŭ 1,20 metroj kaj ĉiu latero de la turo mezuras 4 metrojn: do tio forigas la ideon, ke la turo povus, pro ne sufiĉa surfaca grandeco, enteni ŝtuparon. Sur la fronto orientita al la rivero la konstruintoj aldonis ornamaĵojn de keramikaj plaketoj kun geometriaj formoj kaj pli malpli rebrilaj. En la jaro 1844 oni riparitis la turon kaj oni aldonis je la supraĵo po unu kvadrata koloneto ĉe la anguloj., tiel fortiginte la strangecon de la tuto.

Kio estis iame la utilo de la monumento, aŭ kion ĝi prezentis? Neniu scias. Kleruloj pri historio eldiris diversajn opiniojn. Ekzemple ĝi estus memoraĵo pri romiana militisto Quintus Marcus, aŭ signalo pri antikva tombejo, aŭ trofeo pri iama batalo, k.t.p...Nur certas, ke temas pri gaŭla-romiana konstruaĵo.

Mi kuraĝos eldiri klarigon, kiu ŝajnas historie logika. La turo, alta je 29 metroj kaj staranta sur monteto apud la riverego, estus signalo por la tiama navigado. De plej frua epoko ĝis la 19-a jarcento la riverego Loire estis uzata por navigado. Ekzemple en

Francio la kultivado de vinberoj ne estis konata de la praaĵ keltaj enloĝantoj. La romianaj konkerintoj importis la sekreton de la fabrikado de vino. Tiam la vino estis transportata en argilaj potejoj. Laŭdire la gaŭloj inventis la arton fabrikii barelojn el ligno, pli oportunajn por la transportado. La vino estis transportata ĉefe sur la riveraj vojoj. Ankoraŭ nuntempe la produktaj regionoj de vino estas valoj de grandaj riveroj. Eĉ pro malbona stato de la tiamaj ŝoseoj la vojaĝantoj preferis uzi navigadon kiam eblis. Dum la 19-a jarcento oni konstruis la fervojojn kaj iom post iom la navigado sur la riveroj ĉesis. Sed la riverego Loire ne bone taŭgis por navigado, pro malregula fluado. Dumvintre la akvo-fluo furiozis kun minaco de rompiĝo de la ŝipoj. Dumsomere ĝi malpli fluas ĝis ĝi montras sablajn insulojn, kie la ŝipoj riskas engrundiĝi. Tial laŭlonge de Loire la navigado devas esti signalita diversrimede. Oni eĉ diras, ke la ŝipoj grupiĝis karavane gvidataj de ŝipistoj sur plataj boatoj, kiuj per longaj bastonoj sondis la sekuran vojon trapasotan. Se ni atentis pri la geografia pozicio de la Cinq-Mars turo, ni rimarkas, ke ĝi situas ĉe bordo de la riverego fronte al la kunfluo de la rivero Cher (Ser). El tio oni povas konkludi, ke ĝi estas signalo por navigado sur ambaŭ riveroj. Oni povas ankaŭ imagi, ke la keramikaj plaketoj ĉe la supro donis sufiĉan rebrilon, je sunleviĝo kaj sunsubiro, por plibonigi la videblon de pli granda distanco. Ĉu tiu konkludo de navigada signalo ne donas al la turistoj vizitcelon por kontroli la supozon?

R WATIER



PAĈO DE LA GEKNABOJ

La dankema formiko -

Iam soifa formiko iris al puto por trinki sed ĝi stumblis kaj falis en la akvon, kie ĝi preskaŭ dronis. Feliĉe por la kompatinda insekto ĉi kolombo, kiu sidis sur branĉo de proksima arbo, vidis la danĝeron kaj rapide deŝiris folion de la arbo kaj lasis ĝin fali en la puton. La formiko ĝoje vidis tiun helpilon kaj tuj grimpis sur ĝin. Post kelkaj momentoj la folio atingis la bordon de la puto, kaj tiel la eta formiko estis savita.

Iom poste, birdoĉasisto alvenis kaj klopodis kapti la kolombon per sia reto; sed la formiko rimarkis tion; ĝi alkuris kaj pikis lin en lian kalkanon. La viro haltis kaj klinis sin por vidi, kio okazis al lia kalkano. Tio donis al la kolombo okazon savi sin el la reto kaj gaje ĝi flugis for, dankema por ankoraŭ esti libera birdo.




Tiel helpemo kaj dankemo kreskigos ĉiam ankoraŭ pli da helpemo kaj dankemo.

El: Infana Klubo 10, eldonita de Dana Esperanto-Asocio.

La persistema araneo -

Eta araneo grimpis en la tub'.
Uuŝ! Falis pluvo, puŝis ĝin al sub';
Ekbrilis sun', fortrinkis akvon, re-
grimpis al la supro eta arane'.

Kanteto de svedaj kaj britaj infanetoj



Boitelle

..... Neniu parolis. Antonio, maltrankvila, fajfetis kazernan arion, la patro vipis la ĉevaleton kaj la patrino kaŝrigardis la negrinon, kies vangoj brilis sub la suno, kiel zorge ciritaj ŝuoj. Por ĉesigi la silenton Antonio diris: "Nu, ĉu ni parolas?" - "Necesas tempeto," respondis la maljunulino. "Nu rakontu al la ineto la historion pri la ok ovoĝ de via kokino."

Estis komikaĵo fama en la familio. Sed ĉar la patrino daŭre silentis, paralizita de la emocio, li mem ekparolis kaj rakontis, multtridante, tiun memorindan aventuron. La patro, kiu sciis ĝin parkere, malseverigis ĉe la unuaj vortoj; lia edzino baldaŭ sekvis la ekzemplon kaj la negrino mem ekridegis tiel brueme kaj torente, ke la ĉevalo ekscitite faris mallongan ekgalopon. La interkonatiĝo estis farita. Oni komencis konversacii.

Ĝuste je la alveno, Antonio kondukis sian amatinon en la ĉambron por ke ŝi demetu sian robon: ŝi riskus makuli ĝin preparante laŭ sia maniero manĝaĵon celantan venki la maljunulojn per ventroĝuo. Li tiris al si la gepatrojn antaŭ la pordon kaj demandis kun batanta koro: "Nu, kion vi opinias?" La patro silentis. La patrino, pli aŭdaca, deklaris: "Ŝi estas tro nigra! Ne, vere, estas tro. Tio nigra, ke en la komenco mi kvazaŭ paralizigis." Vi ambaŭ alkiutimiĝos", diris Antonio. "Povas esti, sed ne tuj". Ili eniris kaj la brava mastro emociigis vidante la negrinon kuiri. Tiam ŝi komencis helpi ŝin, kun suprenfaldita jupo, vigla malgraŭ sia aĝo. La manĝo estis bona, longa, gaja. Poste, kiam ili promenis, Antonio aparte tiris al si la patron: "Nu, paĉjo, via opinio?". La kamparano neniam sin kompromitis. "Mi havas nenian opinion. Demandu vian patron. Tiam Antonio iris al sia patrino kaj retenante ŝin li riskis: "Nu, panjo mia, via opinio?" - "Knabo mia, vere, ŝi estas tro

nigra. Nur ii-o-me-te malpli, mi tiam eble ne kontraŭstarus, sed ŝi estas tro nigra. Mi kredas vidi Satanon!". Li tute ne insistis, sciante, ke la maljunulino estas obstina, sed li sentis, ke en lian koron eniras torento de ĉagreno. Li estis surprizita, ke lia fianĉino jam ne venkis ilin, kiel ŝi lin ĉarmegis. Kaj kvarope ili foriris per malrapidaj paŝoj tra la grenkampoj, pli kaj pli silentaj. Kiam ili laŭiris barilon, la farmistoj aperis ĉe la enirejo, la knabetoj grimpis sur la taluson, ĉiuj alkuris al la voĵeto por vidi la nigrulinon, kiun Antoine Boitelle alkondukis. Oni ekvidis en la malproksimo homojn, kiuj kuris tra la kampoj, same kiel oni kuras, kiam sonas la tamburo por anonci la prezentadon de fenomenaj estaĵoj. Patro kaj patrino Boitelle, teruritaj de tiu konstanta sciivolemo ĉie, kie ili preterpasis, rapidigis la paŝadon unu apud la alia, antaŭirante de malproksime sian filon, al kiu lia kunulino demandis pri la opinio de la gepatroj. Li hezite respondis, ke ili ankoraŭ ne havas opinion. Sed sur la placo de la vilaĝo okazis amasa elirado el ĉiuj alarmitaj domoj; kaj antaŭ la kreskanta alvenantaro gepatroj Boitelle ekforkuris kaj revenis hejmen, dum Antonio, naŭzribelanta pro kolero, majeste antaŭeniĝis kun sia amatino ĉebrate, antaŭ ĉies okuloj pligrandigitaj de mirego.

Li komprenis, ke estas finite, ke ne plu eblas esperi; ankaŭ ŝi komprenis tion; ili kune komencis plori. Reveninta al la farmo ŝi denove demetis sian robon por helpi la patron. Ŝi sekvis ŝin al la laktejo, al la stalo, al la koninejo senĉese ripetante: "Lasu min fari" tiel brave, ke la kamparanino diris: "Estas brava knabino. Sed ŝi vere estas tro nigra.".....

....Rakontinte tiun historion Antonio aldonis: "Post tio mi havis kuraĝon por nenio. Neniu profesio povis konveni al mi. Mi fariĝis tio, kio mi nun estas: malpuraĵisto."

El "Boitelle" verkita de Guy de Maupassant (1858-1893) - tradukita de Roland Dupuis.

Ni okupas la lokon

La geedza paro, geemeritoj, sidas senvoĉe dum krepuskiĝo. Ambaŭ kutimiĝas gapadi en la nenio. Tra la fermitaj fenestroj venas la bruoj de la granda urbo. Ili loĝas en la centro. Edmundo, la edzo, heredis tiun-ĉi malnovan loĝejon de siaj gepatroj. La unuĉambra, senstila, komerca loĝejo estas duoble valora: ĝi situas en la urbocentro kaj havas telefonon. Por Edmundo ambaŭ favoroj estas esencaj, ĉar Helena, lia edzino, havas gravan kormalsanon. Ŝia koro funkciadas nur per helpo de stimulilo. Jam dufoje okazis, ke la aparato vane donis la elektrajn signojn. La malsana koro haltis. Tiam Edmundo vokis per telefono al la savanta stacio ne malproksima. Post du minutoj alvenis la ambulanca aŭto. La kuracisto per pli granda elektra frapo ekfunkciigis la koron de Helena; kaj la vivo kontinuas.

De tri jaroj nesolvebla zorgo ronĝas la koron de Helena kaj Edmundo: la sola filo de la geedzoj, Karlo, havas dudekvin jaraĝan filinon. La nepino volas edziniĝi, sed la gejunuloj ne havas loĝejon. Kiam, post la mondmilito, Karlo edziĝis, li translokiĝis en la hejmon de sia bopatro. La ĉiam pli severa ekonomia situacio ne ebligis solvi la loĝproblemon de la nepino. Laŭ la interesuloj nur unu solvo prezentigis: interŝanĝi la loĝejon de Edmundo. La edzino de Karlo jam trovis interŝanĝpartneron en la malproksima antaŭurbo, kiu konsentas cedi triĉambran loĝejon kontraŭ la loĝejo de Edmundo. La maljuna avo bone komprenis kaj bedaŭris la zorgon de sia nepino, sed ne volas interŝanĝi, ĉar li scias, ke la vivo de Helena dependas de la situo de ŝia nuna loĝejo. Lia obstineco estas la kaŭzo de senfinaj kvereloj. Karlo jam ne kuraĝas telefoni al sia patrino, ĉar tiam lia tuta familio rekomencas la akrajn disputojn. El lia laborloko la granda bruo malhelpas la komunikadon. Helena, post kelkaj malsukcesaj provoj ĉesis telefoni al sia filo.

Nun estas la dua tago de la Kristnaska Festo. Antaŭ unu jaro

venis laŭkutime, kune kun siaj familioanoj, viziti la gepatrojn. Tiam ankoraŭ esperis la edzino kaj la filino de Karlo, ke Edmundo finfine akceptos la loĝej-interŝanĝon. Nun, Helena ankoraŭ esperadas, ke venos Karlo viziti ilin, sed kun la krepuskiĝo iom post iom forpasas la espero. Ŝi pensas, ke ankaŭ Karlo suferas. Li volas veni sed la familio malhelpas lin. La simpla virino preĝas: "Kara Dio mia, faru, ke alvenu mia filo! Kion mi pekis, ke vi tiel punas min?" Samtempe Edmundo pensas: "Kiel senindulge egoistaj estas nun ankaŭ la plej proksimaj parencoj!" Poste li konsoliĝas: "Mi scias, ke la sorto de mia nepino estas mizere malfacila... Por la gejunuloj ni, olduloj, estas la egoistoj, ĉar ni ankoraŭ vivas kaj ni okupas la lokon..."

Helena laboris dum la tuta tago por pretigi la ŝatatan bakaĵon de Karlo. Nun ŝi estas tre laca. "Ripozu, kara", diras Edmundo. "Ho jes, sed vespere mi volas rigardi la brazilan filmon ĉe la televido", respondis la edzino. "Vi scias, ke mi ŝatas vidi la sudamerikajn dancojn!" - "Mi scias. Iru dormi, mi vekos vin". La tempo pasas rapide, Edmundo aŭskultas la malregulan spiradon de Helena. Li sentas, ke estus bone lasi la lacan virinon ripozi. Sed en la trista sorto estus kvazaŭ kurac-cela spektaklo kapabla deturni la dolorajn pensojn. Krome, li promesis veki ŝin. Li milde vekas la edzinon. Jam ŝi sidas, kiam venas la koratako, rapide. Edmundo nervoze telefonas. La ambulanca aŭtomobilo, pro la festoj, nur post tri minutoj alvenas. La kuracisto vane klopodas revivigi la mortintan Helena. Li telefonas al sia filo: "Karlo, nun via familio povas interŝanĝi mian loĝejon." En la najbara loĝejo laŭte sonis la arda sudamerika dancmuziko. La loĝantaro de la tuta domo, de la tuta urbo, de la tuta lando sidis antaŭ la televidiloj.

L. Tihanyi

POR VIA

SILAB-ENIGMO

DISTRO

AM-BO-BO-BRO-CI-CO-EL-FLA-FO-FOJ-GO-GO-
JO-JO-KA-KA-KA-KI-KO-KO-KO-KO-KRE-KRI-
KRO-LA-LO-LO- MA-MO-MO-MO-MO-MU-NO-NO-
NO-NO-NO-PER-PI-PI-PIL-PLA-PO-PRA-RA-
RO-SO-SO-SO-STE-SAR-TA-TI-TO-TO-TO-TRO-VA.

El la supraj 60 silaboj formu 30 dusilabajn vortojn kun la sekvantaj signifoj:

1-Nomo de monato.2-Sur la ĉielo estas.3-Parto de la urbo.4-Kreskaĵo ĉe akvoj.5-Trinkaĵo.6-Birda korpoparto.7-Fiŝo.8-Stelema birdo.9-Skribilo.10-Mambest-eto.11-Naĝanta ponto.12-Ludilo.13-Piedvesto.14-Montra vorto.15-Staranta akvo.16-Reĝa seĝo.17-Malpura besto.18-Danĝera fiŝo.19-Koloro.20-Arbo.21-Trinkilo.22-Hunda parolo.23-Demanda vorto.24-Parto de la korpo.25-Lita besteto.26-Malbona ago.27-Sur la piedo estas.28-Vestpurigilo.29-Manĝaĵo por ĉevalo.30-Ĉiam mankanta objekto.

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

lingva scienco	I	sen fiso	S	sen fiso	E	fiŝo	E	reĝo de tribo	E	unu el tri	P
komputilo	E	sen fiso	N	sen fiso	C	sen fiso	K	sen fiso	L	sen fiso	O
parto de urbo	T	sen fiso	E	sen fiso	L	sen fiso	E	sen fiso	R	sen fiso	L
mal pre ĉe	N	sen fiso	E	sen fiso	B	sen fiso	U	sen fiso	L	sen fiso	E
balneario	R	sen fiso	O	sen fiso	R	sen fiso	K	sen fiso	V	sen fiso	A
reĝo de tribo	A	sen fiso	L	sen fiso	O	sen fiso	T	sen fiso	I	sen fiso	D
sen fiso	I	sen fiso	E	sen fiso	A	sen fiso	G	sen fiso	E	sen fiso	N
sen fiso	I	sen fiso	N	sen fiso	D	sen fiso	I	sen fiso	G	sen fiso	O
sen fiso	G	sen fiso	U	sen fiso	N	sen fiso	A	sen fiso	O	sen fiso	V
sen fiso	K	sen fiso	V	sen fiso	A	sen fiso	K	sen fiso	S	sen fiso	P
sen fiso	I	sen fiso	R	sen fiso	I	sen fiso	D	sen fiso	I	sen fiso	A
sen fiso	L	sen fiso	S	sen fiso	D	sen fiso	E	sen fiso	N	sen fiso	T
sen fiso	T	sen fiso	O	sen fiso	A	sen fiso	S	sen fiso	T	sen fiso	I
sen fiso	N	sen fiso	I	sen fiso	O	sen fiso	K	sen fiso	E	sen fiso	R
sen fiso	K	sen fiso	O	sen fiso	R	sen fiso	U	sen fiso	N	sen fiso	D
sen fiso	H	sen fiso	O	sen fiso	S	sen fiso	T	sen fiso	I	sen fiso	O
sen fiso	N	sen fiso	A	sen fiso	C	sen fiso	I	sen fiso	O	sen fiso	

LA VIE DE GRÉSILLON

Forpasis Marcel BODEREAU

Ni sciis, ke li grave malsanas. La informo pri lia forpaso, meze de aŭgusto, tamen dolorige trafis nin. Marcel Bodereau estis unu el la pioniroj de Gresillon, kiu ja helpis diversmaniere ek de la naskiĝo de la Esperanto-Domo. Eble ne konata de la amaso, pro modesteco, li ne ŝparis sian kompetentan helpon, kaj tion liaj amikoj alte taksis. Li partoprenis en la vivo de Gresillon ĝis liaj kapabloj malpermesis al li tion fari.

Lia edzino kaj lia filino scias, ke ni plej amike simpatias kun ili.

Komitat-Konveno 28-06-87-

La kunveno komenciĝas je la 9.30 h. Ĉeestas S-roj Babin P., Bénistant, Boyet F., Dairon, Lagrange, Métivier. Senkulpiĝis: S-inoj Cheverry, Lenel, Vincent; S-roj Babin D., Bodereau, Boyet H., Chevalier, Le Magadure, Lloancy.

La ĉeestantoj konstatas, ke la vintra ĝardeno ankoraŭ ne estas riparita. Pro la vetero? Pro pli "urĝa" laboro sur la nova aŭto-ŝoseo Angers-Le Mans? Ankaŭ aliaj laboroj ne estis faritaj ĝustatempe. Pro grumblado de la prezidanto, kelkaj el tiuj laboroj estos tamen faritaj (aŭ nur ekfarataj?). La fantoma ĝardenisto sendube definitive malaperis. Estis dungita TUC-junulo, kiu laboros po 20 horoj ĉiusemajne. Lia salajro estos pagita de la ŝtato, sed la Domo donos al li krompagon.

La nivelo de la akvo en la lageto subite malaltiĝis ĉar la akvo fluas en alian apudan rivereton tra diversaj kanaletoj. Tiuj estis finfine ŝtopitaj. En junio 40 personoj partoprenis, kun ĉiutaga ĉeesto de almenaŭ 32. En julio ĝis nun anonciĝis por la tri diversaj staĝoj: 50, 35, 20 personoj. La aliĝoj venis pli malfrue ol kutime kaj ni ankoraŭ regule ricevas pliajn. Malpli da aliĝantoj respektas la limojn de la staĝoj. Pluraj deziras restadi dum parto de du sinsekvaj periodoj " por vidi

du programojn". En 1986 la duono el la ĉeestantaro restadis dum nur du semajnoj. Sed pli kaj pli da eksterlandanoj venas precipe por lerni la lingvon.

En junio pasigis po unu tago en Gresillon, grupo da membroj de Franca-Ĉina Amikeco, kaj esperantistoj de Le Mans. Fine de aŭgusto venos la aliĝintoj al la postkongreso de SAT; almenaŭ 50 personoj estas anoncitaj.

Lasta rimarko pri la okazintaj staĝoj, la fakto, ke en junio, dum tiu periodo ĝenerale sen difinita programo, ni estis devigataj organizi tri kursojn.

Projektoj por 1988: dum la printempaj ferioj okazos la kutima renkonto internacia de infanoj sed ankaŭ seminario pri lingvo-instruado kun prezento de diversaj instrumentadoj kaj praktika ekzercado. Preciza programo aperos en novembro. Dum la somero okazos tri dusemajnaj periodoj kaj unu trisemajna. Komence de julio, dum la tradicia preleg-kaj kurs-periodo okazos ankaŭ seminario A por Cseh-metodo. La unua semajno de aŭgusto estos verŝajne dediĉita al originala aktivado gvidata de Claude Piron. Ni ankaŭ esperas, ke la manlaboraj kursoj pli bone funkcios ol la antaŭajn du jarojn.

Koncerne la tereno de la antaŭa fervojo, la notario preparas la

dosieron. - La ĝardenistino bone prizorgas la florojn. La edzo helpas en kelkaj laboroj. Pri la prizorgado de la parko, krom la arbaro prizorgota aparte, kontrakto estos subskribita kun iu CAT (Centro por adaptigo per laboro), kiu instaliĝis du kilometrojn de Gresillon.

S-ino Vincent proponas la faradon de plia libro-vitrino por ekspozicii la librojn de la Libro-Servo en la enirejo.

S-ro Lagrange proponas la konstruadon de malmuntebla scenejo en la granda salono por prezentado de teatraĵoj aŭ kabaredaj vesperoj. Laborgrupo povos realigi tion dum la proksimaj printempaj ferioj. Okaze de la venonta kunveno de la komitato, verŝajne la 18-an de oktobro, estos precizigita la programo por 1988.

La sekretario: Guy Dairon

LIBRO - SERVO

Notre catalogue est à votre disposition. Nous vous le ferons parvenir contre un timbre-poste. Nous pouvons vous fournir tous les livres non épuisés et toutes les nouveautés.

Faites vos commandes sur lettre de préférence. Si vous êtes sûr du montant de la commande, joignez un chèque. Sinon attendez la facture qui sera jointe à l'envoi.

N'oubliez pas que les envois se font **franco au-dessus de 400 francs.**

Adressez vos commandes à : J. VINCENT, B.P. 54, 49150 Baugé.

Intitulé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

esperantigis R. DUPUIS

bonega traduko de ĉefverko
(vidu eltiraĵon, paĝo 10)

Prezo : 36,00 FF

NIA KONKURSO



Solve de la lasta enigmo (K.K. 87-2)

Por plenumi la difinitan laboron Petro bezonus 20 tagojn, Paŭlo 30 tagojn kaj Johano 60 tagojn.

Inter la partoprenintoj estis dislotataj libro-premioj.

200 f.f. al : Francis Lanz, Parizo.

100 f.f. al : Henrik Karlsson (Svedio).

50 f.f. al : M.-J. Berger, Clermont-Ferrand.

Ili ricevos nian katalogon el kiu ili povos elekti la libro(j)n.



Nova konkurso (K.K. 87-3)

La solvon vi rajtas sendi ĝis la 30-a de novembro. Inter la gajnintoj estos dislotataj libropremioj en la valoro de 200, 100 kaj 50 francaj frankoj.

Vi devas trovi frazon skribitan de G. Baghy. Tiu frazo entenas 58 literojn numeritaj de 1 ĝis 58 ; ĝi ne entenas la literojn numeritajn 59, 60, 61, 62, 63. Tiun frazon vi trovos helpe de la ĉi

sube trovotaj vortoj. Al ĉiu numero respondas litero de la trovota vorto, kiu samtempe, en sia numer-loko, estas litero de la frazo.

1. 10. 52. 31. 24. 5. 59. 13 :
elmeti el akvo.

19. 30. 22. 16. 27. 49. 60. 42. 52. 32 :
homo, kiu dumdorme agas.

6. 34. 33. 55. 61. 57. 58. 23. 45 :
kunmeto de senharmoniaj sonoj.

52. 47. 44. 37. 16. 41. 15 :
specio de krizantemo.

9. 18. 62. 2. 17. 38. 55 :
dividaĵo de libro.

29. 48. 58. 63. 7. 20. 50. 62. 30 :
konkurso kun egaligitaj ŝancoj.

11. 21. 8. 26. 38. 40. 20. 43. 53 :
rekondukita al pli malvastaj limoj.

25. 4. 16. 47. 58. 14. 10. 3. 34. 35 :
malplenaj.

36. 18. 28. 17. 34 :
evitanta la voluptajn dezirojn.

12. 27. 16. 42. 39. 32 :
punta garnaĵo.

54. 10. 56. 51. 17. 46. 15 :
malgranda mamulo.



Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (220 aŭstr. ŝil.).
- Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7.00 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (80 kr.).
- Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (60 mk).
- Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
- Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^c-D 03003 ALICANTE - (1 300 pes.).
- Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (180 n.l.).
- Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).
- Norvegujo** : S-ino Louise Bøe Marmarvn 2A Oslo 11 (60 kr.).
- Pollando** : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
- Svedujo** : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (65 kr.).
- Svislando** : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.